

PROGRAMO DE LA VENONTAJ SEMAJNOJ

Septembro 2008

- 3 Kunsido revena, unua post someraj ferioj. Rakontu pri ferioj.
 10 Semajna kunveno.
 17 Semajna kunveno.
 24 Semajna kunveno.

Oktobro 2008

- 1 Kristin Tytgat pri interpretado kaj universitata interŝanĝo.
 8 Semajna kunveno.
 15 Semajna kunveno.
 22 Semajna kunveno.
 29 Semajna kunveno.

KIE ESPERANTUMI BALDAŬ

19 - 21. septembro: **XXIV Artaj Konfrontoj en Esperanto "ARKONES"**. Granda manifestacio de Esperanto-Kulturo en **Poznań**, Pollando. Paralele kun ĝi okazos sesio de interlingvistiko en Esperanto ĉe Universitato Adam Mickiewicz. Inf: tel.: +48-509-400-317. rete: arkones@esenco.org

4 - 11. oktobro: **XVI Internacia Esperanto Semajno** de la Kulturo kaj Turismo en **Salou** (Tarragona) Katalunio/Hispanio. Kiel renkontiĝejo funkcios tristela hotelo Mediteraneo. La programo konsistas el prelegoj, debatoj, kurso pri Esperanto, ekskursoj kaj disdonado de la Premio Ada Fighiera-Sikorska. Inf.: Louis Serrano Pérez, Apartat 423, ES-08200 Sabadell (Barcelona). Tel: +34-937275021 serrano@mixmail.com

11 - 13. oktobro : **XCV Japana Esperanto-Kongreso** en **Ŭakajama**. Inf: jek08@jei.or.jp

26. oktobro - 2. novembro : **III Kijiva Esperanto-Semajno**. Inf: p/k 35, Kijiv-133, UA-01133, Ukrainio; tel.h. +38044-2851701, tel.p.+3-80974403172; [Volodimir Hordijenko](mailto:Volodimir.Hordijenko)

7 - 8. decembro: **XXXIV Kataluna Kongreso** de Esperanto en **Sabadell**, Hispanio.

12 - 14. decembro: **IX Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj**, Pollando. Inf.: Bjalistoka E-Societo, tel. post la 20.00 h. +48.85.7 44 22 13, skribe PL -15-282 Bialystok, Piekna 3, p.k.67, rete esperanto.bialystok@interia.pl

27. decembro - 3. januaro: **XXV Jubilea IF - Internacia Festivalo** en **Düsseldorf**, Germanio. Tuttaga ekskurso al Aachen- Maastricht-Liège (trilanda angulo DE-NL-BE). Plilongiga ebleco ĝis 4-a de januaro. Inf: Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, 34303 Niedenstein, Germanio. Tel./fakso +49-5624-8007, portebla +49-171-4964558, Rete: IF/Platz

27. decembro - 3. januaro: **VII NR - Novjara Renkontiĝo** en **Frankfurt/Main**, Germanio. Multaj mezaĝuloj kaj familioj. Inf: EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wiciefstr. 9, 2. Gartenhaus, 10551 Berlin, Germanio. Tel: +49-30-685 58 31, Rete: [nr2008_9\(ĉe\)esperantoland.org](mailto:nr2008_9(ĉe)esperantoland.org)

1 - 10. majo 2009: **XXI Esperanto-festivalo "Aroma Jalto"** en Ukrainio. Inf.: p/k. 35. UA-01133 Kijiv, Ukrainio. tel.: +380-44-2851701, +380674403172. rete: volodimir@ukr.net

25. julio - 1. aŭgusto 2009: **XCIV Universala Kongreso** en **Bjalistoko**, Pollando. Inf: UEA, Nieuwe Binnenweg 193, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel: +31-10-4361044, rete: info@uea.org

www.eventoj.hu

Solvo de la magia kvadrato, paĝo 8: FRAKAS'; RAPORT'; APARTA; KORBET'; ARTERI'; STATIL'.



ESPERANTO aktuala

INFORMILO DUMONATA de la ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO
 Septembro - Oktobro 2008 Fondita en 1976 de Leo de Bruyne, Nova Serio N°5

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Claude Gladly, cgladly@arcadis.be, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52 Sekretario: Hélène Falk-Bracke, 7 avenue des Chênes, 1640 Rhode StGenese, informas +32 2 3584214, helenef.falk@skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono) In formoj: <http://users.belgacom.net/EBG> <http://ebg.skynetblogs.be> <http://uea.org> www.esperanto.be www.esperanto.net <http://eo.eventeo.net>

ENHAVO

- Paĝo 2 - Hélène Falk-Bracke pri Jean PIAGET
 Paĝo 3 - Marc Demonty pri gesinoroj JACOBS
 Paĝo 4 - Lee Chong-Yeong, eksa prezidanto de UEA
 Paĝo 6 - Probal Dasgupta, nuna prezidanto de UEA
 Paĝo 7 - Langrampiloj; blekoj; jes, eble, ne!
 Paĝo 8 - Azianoj dormemaj kaj magia kvadrato
 Paĝo 9 - Fotoj de fermlernjara vespermanĝo de EBG
 Paĝo 10 - Fotoj de kunvenoj kaj kongresoj dum 2008
 Paĝo 13 - J.A.Pinto de Sousa pri lingva politiko de EU
 Paĝo 17 - Paŭlo Moĵajev pri trolebusoj en Krimeo

LA PAĜO DE HÉLÈNE FALK-BRACKE

Jean PIAGET (Neuchâtel 1896 – Genève 1980)

Kial dediĉi artikolon al sciencisto de la dudeka jarcento, kiu ne estis Esperantisto? Ĉefe ĉar li observis kiel infanoj akiras la parolon ekde sia naskiĝo kaj sufiĉan konon de la denaska lingvo. Li konkludis ke ekde la dua jaro, la penso de la infano funkcias laŭ ĝeneraliga asimilado (généralisation assimilatrice), kio ampleksas denaskajn refleksojn (réflexes innés).

Claude PIRON, en la libro **Le Défi des Langues** (paĝoj 135 kaj sekvaj-eldono 1994-L'Harmattan-Paris) reprenas la studadon de PIAGET, kies studmaterialo estis liaj 3 infanoj, kaj konkludas ke sammaniere **Esperanto funkcias per ĝeneraliga asimilado!**

Ĝeneraligi skemojn estas enskribita en nia nerva sistemo. Ĝi estas natura. La **kondiĉitaj refleksoj venas de la influo de la medio** – ili devas inhibicii niajn naturajn refleksojn – sed se vi estas tre laca aŭ tre stresita, povas okazi ke denaska reflekso venas al via cerbo antaŭ la kondiĉita reflekso - kaj se vi parolas publike, tio povas esti tre ĝena... Ekzemple, okazis al mi, en tre malamika etoso alparoladi la ĉeestantojn per « **Vous disez** » anstataŭ « vous dites ». La reagon, vi imagu !

Se tio povas okazi eĉ en onia denaska lingvo, ni kompatu la homojn kiuj devas paroli en fremda lingvo. Parolante, kaj debatante, ili devas pensi pri alia strukturo, pri ĝusta prononcado, ili estas stresitaj, ili ne volas iĝi ridindaj; ili devas tiel zorge atenti « kiel diri » kiam estus momento por pensi nur pri « kion diri », ke ofte ili preferas diri nenion.

Kial multaj komencantoj entuziasmiĝas pri Esperanto? ĉu ili sentas ke Esperanto tuŝas pli profundan lingvokonscion ol la aliaj lernitaj lingvoj ?
Claŭde PIRON asertas ke « franclingvano kiu parolas la rusan restas franco kiu scipovas la rusan, sed se li parolas Esperanton, li identiĝas al la lingvo, li sentas sin kaj franclingvano kaj esperantisto. » Ĉu oni povus aserti ke Esperanto funkcias kiel la homa cerbo ?

*Claude PIRON : Le Défi des langues : estas pruntebla en nia biblioteko.
Pri Jean PIAGET serĉu en Google. Li estas konsiderata kiel la plej granda psikologo de la XX a jarcento.*

Hélène Falk

... kaj problemoj.

Bedaŭrinde, pro la kolapso de Sovetio kaj ĝenerala malprogreso de la enlanda ekonomio en la 90aj jaroj la trolebusa linio spertis stagnadon kaj eĉ malprogreson. Malboniĝis aŭ eĉ tute ruiniĝis la rilatoj kun la eksterlandaj produktantoj de la necesaj ekipaĵoj (preskaŭ ĉiuj krimeaj trolebusoj estis produktitaj en Ĉeĥio), signife malgrandiĝis la ŝtata subteno. En la tempo de ekonomiaj reformoj la ekologiaj demandoj iĝis malpli gravaj, ol rapida profito. Krome, multaj el la modernaj homoj preferas rapidecon kontraŭ ajna prezo. Rezulte anstataŭ subteni la unikan trolebusan linion oni aktivege ekuzis la busojn – dum la lastaj 10-15 jaroj la busa trafiko sur la vojo Simferopolo-Jalto iĝis kelkoble pli intensa, dum la trolebusa trafiko dum kelkaj jaroj nur vegetis. Multaj opinias la trolebusan linion eksmoda aŭ eĉ malutila – onidire, la relative grandaj kaj malrapidaj trolebusoj malhelpas la rapidan veturadon de aliaj aŭtoj. Tamen, se oni kontrolos la statistikon kaj ekscios, kiel oftas aŭto-akcidentoj (ĉefe inter personaŭtoj kaj busetoj) sur la ŝoseo, oni vole-nevole preferos trolebuson kiel malrapidan, sed pli sekuran transportilon.

Lastatempe tamen aperas la signoj de ioma vigliĝo. La trolebusa linio estas aparte bezonata somere, kiam eĉ intensega busa trafiko ne povas transporti ĉiujn vizitantojn de Krimeo – tiam la trolebusoj plenplenaj je pasaĝeroj estas tute kutima bildo. Dum vintro la trolebusoj malpleniĝas, sed daŭre estas uzataj de ŝparemuloj (la kosto de la trolebusa veturo estas preskaŭ duoble malpli granda, ol tiu de la busa) kaj ŝatantoj de ekologio (ankaŭ tiuj ne malmultas!). Do la trolebusa linio certe vivos, sed ĉu ĝi estos subtenata kaj aprezata – tio jam dependas de multaj faktoroj. Ne laste tio dependos de la ekologia konscio kaj informiteco de la loĝantoj kaj gastoj de Krimeo.

Se vi iam venos en Simferopolon, mi rekomendas al vi nepre veturi en Jalton per trolebuso. La vojaĝo estos iom pli longa, ol la perbusa, tamen vi povos plezure pasigi tiun tempon rigardante la belaĵojn de la krimea naturo – grandaj fenestroj de trolebuso ebligas tion! Kaj krome, vi ĝuos la senton, ke vi almenaŭ iom helpis al Krimeo resti pura kaj bela!

Paŭlo Moĵajev, artikolo antaŭ aperigita en **KONTAKTO**

FIGHIERA EN HERZBERG

Eksa prezidanto de Esperantista Brusela Grupo, Gian Carlo Fighiera, nun loĝante en Torino, Italio, helpas kiel volontulo dum du monatoj en Herzberg, memnomata esperanta urbo en Germanio. Flanke de Job-Center helpas por ordigado de gazetoj kaj libroj, Gini Asanov el Osterode, Hartmut Hilbert el Lonau kaj Thomas Garczarek el Herzberg. Hejmpaĝo de Interkultura Centro Herzberg: <http://ic-herzberg.de>



Fighiera fotita de P.Branco en Vilnius, Teĵa k.

En la plej suda parto de la duoninsulo – sur la mallarĝa ter-strio inter la montoj kaj la maro – troviĝas la plej varma regiono kun subtropika klimato kaj kun la naturo, tute ne simila al la transmontara. Kaj ĉion ĉi ĉirkaŭas la Nigra Maro, kiun unu poeto foje nomis "la plej blua en la mondo".

Tute ne hazarde Krimeo estas populara ripoza kaj kuraca loko. Ĝiaj urboj, aparte – la fama kuracloko Jalto, situanta sur la suda bordo, estas ĉiusomere amase vizitataj de multaj gastoj, inter ili – ankaŭ alilandaj.

Trolebusa linio – la esperoj...

Estas nenio stranga, ke post la Dua mondmilito komenciĝis plej aktiva kaj rapida renovigo de la ripoza kaj kuraca industrio en ĉiuj urboj de Krimeo. Oni konstruis novajn vojojn, novajn ripozejojn, kaj atendis – tute prave, kiel poste montris la historio – grandan alfluan de vizitantoj. Bedaŭrinde, pro la reliefaj kondiĉoj estis preskaŭ neeble konstrui fervojan linion inter Simferopolo (la ĉefa urbo de Krimeo) kaj la suda bordo. Tial por preveni la poluadon de la mirinda krimea naturo pro aktiva busa trafiko oni akceptis la decidon pri konstruado de interurba trolebusa linio, kiu devis ligi Simferopolon kun du urboj de la suda bordo – Aluŝto kaj Jalto.

La konstruado estis plenumita mirinde rapide. En la jaro 1959 oni lanĉis la unuan parton de la linio (inter Simferopolo kaj Aluŝto), la dua parto estis finkonstruita en 1961. La plej alta punkto de la linio troviĝas 752 metrojn super la marnivelo. La linio konektis tri urbajn trolebusajn sistemojn kaj atingis la longon de 86 kilometroj. Krom la trolebusajn parkejojn oni konstruis 16 elektrajn subcentralojn, starigis pli ol 3 mil drat-mastojn, kaj pendigis pli ol 200 kilometrojn da elektro-dratoj.

Por tiu tempo interurba trolebusa trafiko estis preskaŭ revolucia. Tiutempaj busoj estis malpli komfortaj kaj rapidaj, ol nun, do la preskaŭ 3-horojn longa vojaĝo en trolebuso tute ne estis malfacila. Aldone, tra la fenestroj de la trolebuso oni povis bonege pririgardi la naturajn vidindaĵojn (en la komencaj jaroj la konduktoj eĉ laboris kiel ekskursgvindantoj dum la veturado).

En la 70-80aj jaroj de la 20a jarcento la trolebusa linio travivis siaj plej bonan tempon. Somere dum dek minutoj nemalofte startis kvar-kvin trolebusoj! Oni povis anticipi aĉeti bileton por la krimea trolebuso en kelkaj grandaj urboj de Sovetio, eĉ tiel foraj, kiel Leningrado (nun Sankt-Peterburgo) kaj Rigo. Dank' al la teknikaj modernigoj oni mallongigis la vetur-daŭron de Simferopolo al Jalto ĝis 2,5 horoj. La trolebusa linio bonege plenumis sian transportan funkcion, kontribuis al konservado de la naturo kaj eĉ iĝis unu el la allogaĵoj de Krimeo.



VETERANA PARO FORLISIS NIN

Komence de julio ni funebris pro la perdo de elstara persono de nia grupo, sinjorino Rose Jacobs.

Ŝia edzo René Jacobs, honora prezidanto de EBG forpasis en januaro ĉi jara. Ambau jam de multaj jaroj ne plu partoprenis aktive la vivon de la grupo, pro sanaj kialoj.

Okaze de la 100 jariĝo ili estis rekontaktitaj sed bedaurinde ne povis ĉeesti la festadon.

La lastan fojon kiam ili estis honorigitaj kiel veteranoj, estis dum komuna manĝo kun Marc Delforge kaj Elfriede Ernst ankaŭ nun forpasintaj.

Gesinjoroj Jacobs, dum longa periodo kiu finiĝis en la 70-a jaroj plenumis gravajn funkciojn en la grupo, li kiel prezidanto, ŝi kiel kasistino. Li estis prezidanto dum la periodo de la UK de UEA en Bruselo. Pliajn detalojn pri tiu epoko vi povas (re)legi en la broŝuro redaktita de Helène Falk.

René Jacobs profesie apotekisto, estis tre zorgema kaj precizema, kio respeguliĝis en lia prezidanta agado. Lia tempe ekzistis almenau tri e-grupoj en Bruselo (SAT grupo, fervojista grupo kaj EBG) kaj li dediĉis multan atenton al interkompreno kaj kunlaboro inter ili. Rose Jacobs, sia flanke eks-instruistino estis ĉiam afabla kaj sindoneme plenumis la taskon de kasistino.

Al iliaj filino, bofilo kaj nepino, gesinjoroj Bettoni-Jacobs la grupo esprimas sian plej sinceran kunsenton.

La Esperanto movado nur pluvivas dank al pacienca laboro de niaj antaŭuloj, ni danke pensu pri ili kaj flegu ilian memoron.

Marc Demonty

MIA HISTORIO PERDIĜAS INTER LA HOMAMASO

Kiam mi eliras al la torento
de la fluanta homamaso, miaj
paŝoj perdiĝas inter la aliaj
paŝoj forviŝitaj de la vento.

Kaj sen ili, sur la strata cemento,
mi trairas sola: sen historiaj
momentoj; lante sub la sunradiaj
lumoj, paŝo post paŝo, en silento

mi iras farante vojon, paŝante
la paŝadon eterne. Kaj mistere
ĉiuj la paŝosignaĵoj konstante

solviĝas en la neniaĵo. Vere
el ĉi tiu vivo ĉiunstante
dissolviĝas kiel la paŝoj tere.



Alberto Garcia Orive, Bilbao

LEE CHONG-YEONG NE PLU INTER NI

Prof. d-ro Lee Chong-Yeong, eksa prezidanto de UEA, forpasis post elĉerpa malsano la 4-an de julio en la aĝo de 76 jaroj. Lee naskiĝis la 13-an de februaro 1932. Li studis ĉe la universitatoj Yeungnam (Koreio), Hawaii kaj Harvard (Usono) kaj doktoriĝis pri komerca ekonomiko en la Universitato de Kobe (Japanio). Dum sia profesia kariero li estis ĉefo de la merkatumo grupo de la UN-organizo pri Nutraĵo kaj Agrikulturo, kaj profesoro de la Kyungpook Ŝtata Universitato (Korea Respubliko).

Li estis ĉefkonsilanto de la Korea Industria kaj Evoluiga Instituto, gastprofesoro de la Universitato de Kobe, honora profesoro de la Nankaj-Universitato (Ĉinio) kaj orda profesoro de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino. Lee Chong-Yeong lernis Esperanton aŭtodidakte en 1948. Li estis prezidanto de Korea Esperanto-Asocio (1994-95, 1998-2001), prezidanto de UEA (1995-1998) kaj vicprezidanto de UEA (2001-2004). Kiel prezidanto de UEA li distingiĝis kiel dinamika kaj iniciatema gvidanto, kies plena sindediĉo al Esperanto, sincereco kaj persona ĉarmo faris lin amata de ĉiuj. Li kuniniciatis la unuan Nitobe-simpozion en la Universala Kongreso en Prago en 1996 kaj la Manifeston de Prago, kiu, subskribita de pli ol 13000 esperantistoj, plu restas la gvida dokumento pri la celoj de la Esperanto-movado. En 1996 prezidanto Lee lanĉis Kampanjon 2000, kiu kune kun la Manifesto de Prago katalizis senteban pliaktiviĝon en UEA kaj la cetera movado. Lee Chong-Yeong verkis "Esperanto en la 21-a jarcento" (2001), "Esperanto, la lingvo de la 21-a jarcento" (en la korea, 2001), "Esperanto kaj internaciaj organizaĵoj" (2003) kaj "80-jara historio de la korea Esperanto-movado" (en la korea, 2003), "Ridante lernu" (2007), kaj "Elektitaj Zamenhofaj proverboj" (2008). Li ankaŭ havis esencan rolon en la estigo de la Esperanta eldono de "Historio por malfermi estontecon" (2007), libro pri la moderna historio de Ĉinio, Japanio! kaj Koreio. En 2004 Lee Chong-Yeong estis elektita honora membro de UEA pro liaj elstaraj meritoj por UEA kaj tutmonda Esperanto-movado. Li estis ankaŭ honora prezidanto de Korea Esperanto-Asocio. La ĉina ŝtato dekoraciis lin per la Medalo de Entuziasma Subteno de Konstruo kaj Kunlaboro por Ĉina Amikeco, kaj la prezidento de Vjetnamio per la Medalo de Entuziasma Subteno por la Vjetnama Esperanto-Movado.

Gazetaraj Komunikoj, N-ro 289, 2008-07-04



KRIMEO KAJ TROLEBUSO - ĈU BONA PARO?

Verŝajne, multaj legantoj scias pri la duoninsulo Krimeo (ĝi troviĝas sude de Ukrainio, ĉe la Nigra Maro); kelkaj eble eĉ sukcesis viziti ĝin. Sed ĉu vi scias, ke en Krimeo troviĝas unu mirinda teknikaĵo, eble meritanta la eniron en la Guinness-libron? Temas pri la interurba trolebusa linio Simferopolo-Jalto, kiun oni opinias la plej longa interurba trolebusa linio en la mondo!

Iom pri trolebuso

La vorto "trolebuso" estas, fakte, kunmeto de la vortoj "buso" kaj "troleo". La vorto "troleo" (venanta el la angla vorto *trolley*, kiu, siavice venas de la verbo *troll*, kiu signifas "turni", "ruli") estas uzata por nomi la mekanismon, kiu moviĝante (ĉu glite, ĉu turne) laŭ la drato povas "preni" de ĝi la elektron. La principa diferenco inter trolebuso kaj tramo – alia urba transportilo, movata de elektro – estas la fakto, ke trolebuso ne bezonas relojn, ĉar havas la ĉasion kaj karoserion preskaŭ idendan kun tiuj de aŭtobusoj. Do, stirata trolebuso povas moviĝi relative libere – gravas nur plu teni la kontakton inter la trole-havaj stangoj kaj la elektrodonaj dratoj.

La historio de trolebuso komenciĝis en 1882, kiam germana inĝeniero E. W. von Siemens funkciigis la unuan eksperimentan trolebuson en antaŭurbo de Berlino. Dum kelkaj jaroj la uzado de trolebusoj estis sporada kaj, fakte, nur eksperimenta. La unua pasaĝera trolebusa linio estis lanĉita nur en 1901 – tio okazis en Bielathal (apud Dreseno, Germanio). De post tiu tempo la trolebusaj retoj aperis en multaj landoj de la mondo, iom forpuŝinte la tramojn, kiuj aperis iom pli frue. La konstruado de la trolebusaj retoj estis aparte aktiva en eksa Sovetunio. Nuntempe plej multaj urboj kun trolebusa trafiko troviĝas en Rusio.

Kompare al ŝiaj parencoj – tramoj kaj busoj – trolebuso havas kelkajn gravajn avantaĝojn. Ĝi estas pli ekologia, ol busoj, kaj samtempe pli "lerta", ol tramo: trolebuso ne bezonas relojn, povas sufiĉe facile manovri inter aliaj aŭtoj kaj pli facile superas diversajn altaĵojn (pro tio, ke la frot-kuniĝo inter la gumaj bendoj kaj asfalto estas pli granda, ol inter la ŝtalaj reloj kaj radoj). Krome, trolebuso produktas signife malpli da bruo, ol ĉiuj aliaj urbaj transportiloj, pro kio ĝi estas aparte bona por urboj. Kompreneble, ankaŭ malavantaĝoj ne mankas – trolebuso estas tamen ligita al la elektraj dratoj kaj ege dependas de la senproblema funkciado de elektrocentraloj. La modernaj trolebusoj tamen havas grandkapacitajn akumulilojn, dank' al kiuj ili povas dum iom da tempo esti tute aŭtonomaj okaze de iuj problemoj pri elektro.

Resumante, oni do povas konstati, ke trolebuso estas relative bona solvo por la urba trafiko kaj de la teknologia, kaj de la ekologia vidpunktoj.

Iom pri Krimeo

Krimeo estas duoninsulo en la norda parto de la Nigra Maro. Nuntempe ĝi apartenas al Ukrainio, sed dum sia historio ĝi vidis plej diversajn etnojn – skitojn, helenojn, romianojn, gotojn, sarmatojn, slavojn, italojn, kipĉakojn kaj multajn aliajn. Ankaŭ nun ĝi restas tre multnacia regiono – kompreneble, tiel interesa historio postlasis multe da neordinaraj vidindaĵoj.

Ne nur la historio, sed ankaŭ la naturo de Krimeo estas alloga. Malgraŭ tio, ke la duoninsulo estas ne tre granda (ĝiaj proksimumaj dimensioj estas 200*320 kilometroj), en ĝi estas mirinde interplektitaj tute diversaj naturaj zonoj. La pli granda norda parto de la duoninsulo estas okupita de stepoj. Pli sude troviĝas la Krimea Montaro (ĝia plej alta pinto atingas 1545 metrojn), kovrita de aromaj arbaroj kaj herbejoj, riĉa je pitoreskaj rokoj, profundaj intermontejoj kaj misteraj kavernoj.

Ĉe la Komisiono la laborlingvoj estas tri: la franca, angla kaj germana. Ĉe la Konsilio, por la produktado de originalaj dokumentoj, oni uzas precipe la anglan kaj la francan. Tamen, la germana ankaŭ estas uzata kiel laborlingvo, kvankam multe malpli ofte ol la angla kaj la franca. La ceteraj lingvoj estas uzataj nur margene en originalaj dokumentoj.

Alia estas la situacio ĉe la Eŭropa Parlamento. La membroj de la Parlamento estas politikistoj, elektitaj pro ilia politika kapablo kaj – kompreneble – ne pro ilia kono de lingvoj. Multaj parlamentanoj kapablas paroli nur sian gepatran lingvon kaj tute ne aŭ malbone regas aliajn lingvojn. Ili mem devas prepari multajn dokumentojn: raportojn, projektojn de rezolucioj, proponojn pri amendoj, skribaj kaj parolaj demandoj al la Komisiono kaj al la Konsilio, ktp. Kaj ili rajtas redakti tiujn dokumentojn en sia propra lingvo. Pro tio, ĉiuj oficialaj lingvoj de la Unio estas multe pli ofte uzataj kiel laborlingvoj en la Parlamento, proporcie al la nombro de parlamentanoj kiuj parolas ilin.

Alia gravega aspekto de la uzado de la oficialaj lingvoj estas la parola uzado kaj la samtempa interpretado. Krom en la Eŭropa Parlamento, en ĉiuj institucioj okazas ĉiutage kunvenoj en kiuj partoprenas reprezentantoj de la membro-ŝtatoj, specialistoj kaj fakuloj, kiuj rajtas uzi sian propran lingvon – tio estas, paroli mem en tiu lingvo kaj aŭskulti tradukon al sia lingvo de la paroladoj de alilingvaj partoprenantoj. Kompreneble, kiam la ministroj de la membro-ŝtatoj kunvenas en la Konsilio, ili uzas ankaŭ sian propran lingvon.

José Augusto Pinto de Sousa

Profesia tradukisto en la Konsilio de Ministroj de Eŭropunio, Bruselo
Daurigota, unua parto de la prelego en La Verda Stelo, Antverpeno, la 18-an de Januaro 2008

TEJO REFORMAS PASPORTAN SERVON

Dum la 64-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Szombathely (Hungario), 26 anoj de la komitato de TEJO decidis reformi la plej popularan servon de la asocio. Ekde la venonta jaro la listo de gastigantoj transformiĝos en rete alireblan datumbazon, sed ankaŭ la papera eldono plu haveblos. La komitato de TEJO kunsidis dum la IJK, kiun partoprenis pli ol 350 junaj esperantistoj. Ĉiuj komune festis dum la IJK la 70-jaran jubileon de la fondigo de TEJO en 1938.

www.liberafolio.org



NI NE PLORU, SED RIDETU

Ni ne ploru ĉar li forlasis,
sed ni ridetu ĉar li vivis.

Ni ne fermu niajn okulojn kaj preĝu ke li revenu,
sed ni malfermu niajn okulojn kaj vidu kion li lasis.

Nia koro ne malplenas ĉar ni ne plu vidas lin,
sed nia koro plenas de la amo kiun ni reciprokis kun li.

Ni ne turnu nian dorson de morgaŭ kaj vivu en hieraŭ,
sed ni estu feliĉa morgaŭ pro hieraŭ.

Ni ne rememoras lin kiu foriris,
sed ni amas la memoron pri li kaj lasas ĝin vivadi.

Ni ne ploru, fermu niajn okulojn, malplenigu la koron
kaj turnu nian dorson,
sed ni faru kion li volis; ridetu, malfermu la okulojn,
amu kaj iradu antaŭen.

LEE Chong-Yeong, 20 Oktobro 2007

HAIKO

Blankas ĝasmenoj
Floras jen amikeco
en la urb' Ventspils

*44-aj Baltiaj Esperantaj Tagoj,
Ventspils, Latvio,
5-12 Julio 2008
JAMADA Tadaŝi*

Hajko (el japana 俳句, *haiku*) estas tradicia japana poeziaĵo konsistanta el unu vertikala 17-silaba linio, enhavanta tri fonetikajn partojn de 5, 7, 5 silaboj. En Esperanto, hajkoj aperas en tri horizontalaj linioj de 5, 7, 5 silaboj. Verkita en simpla lingvaĵo ĝi kutime priskribas la naturon: ofte detalojn, kiujn homoj apenaŭ perceptas. Hajkoj nur priskribas, ne komentas aŭ prijuĝas. Tiel ili invitas la legantojn al meditado. Tradicia hajko estas sen titolo.

La plej ofte citata hajko eble estas tiu ĉi de **Matsuo Baŝo**:

古池や	furu ike ja	L' olda lageto
蛙飛び込む	kavazu tobikomu	Malgranda rano ensaltas
水の音	mizu no oto	L'akva plaŭdado

Tradukoj de:

Kalman Kaloksaj	kaj	Mijamoto Masao
Lag' forlasita,		Jen akvo plaŭdis,
Kaj muta. Plaŭd'. Ensaltis		laget' malnova plonĝon
Rano subita.		de ran' ekaŭdis.

POPOLA KAJ MALPOPOLA POSEDO DE LA LINGVA RIĈO: la dunormeco sub kognu lupeo

(resumo de la prelego de Probal Dasgupta dum la 93_a ŬK en Roterdamo, 19-26 Julio 2008)

Iuj lingvoj tre evidente, kaj multaj aliaj malpli evidente, faras distingon inter tiu facila aŭ malalta lingvonormo, kiun kapablas uzi ankaŭ la infanoj kaj la malkleraj anoj de la publiko, kaj tiu malfacila aŭ alta lingvonormo, per kiu plene funkcias la skribaj diskursoj sur la fakaj terenoj. La termino diglosio, aŭ dunormeco, indikas tiun terenan diversecon ene de ĉiu lingvo. En iuj ekstremaj kazoj, kiel la araba aŭ la greka aŭ la tamila, la alta normo tiel frape disiras de la malalta, ke ĉiuj devas eksplicite paroli pri tiu diverĝo kaj pritrakti ĝin en la pedagogia sistemo. De tiaj ekzemploj ni ricevas la terminon kaj la plej bazan kaj forman komprenon de la fenomeno diglosio. Sed postaj esploroj montris, ke la diglosio sur la nivelo de la lingva substanco estas io universala. Tiu ĉi fakto estas tre grava por la kognoscienca aliro al la lingvaj fenomenoj. Laŭ tiu aliro, aparte gravas la rilato inter la facila parto kaj la malfacila parto de la lingvoscio de ĉiu individuo, ĉar tiu lingvoscio sin ankras en la facila parto. Ni devas evoluigi sociscienca aliron, kiu donas taŭgan rolon al tiu ĉi nun esplorata kognoscienca perspektivo; la nunaj rimarkoj faras unuan kontribuon en tiu direkto.

Se ni enfokusigas la multe priskribitan kazon de la diglosia rilato inter la angla kaj la barataj lingvoj, ni trovas dividon de laboro, kiu ligas la anglan kun la eduka sistemo, precipe kun la supera eduko, kaj la baratajn lingvojn kun la emocia kaj kultura partoj de la spektro. Por preteriri tiun ĉi laŭimpresan leĝon de la faktoj, ni bezonas apliki al ili teoriaran ilaron, kiu kombinas la socilingvistikon de la diglosio kun la diferencigita leksikologio en la kadro de la genera lingvistiko. Devus ne esti seninterese al la aŭdantaro, ke en tiu ĉi teoria aliro aperas ankaŭ Esperanto kiel interleksika glosilo. La lingvo-kultivado ofte okupiĝis pri la plurlingvaj socioj, sed nesufiĉe intense pri la rolo de la diglosio en la lingvo-kultivado. Ĉi tiu prezento evoluigas la proponon, ke modernaj socioj, por kultivi la tuton de sia lingva trezoro, bezonas naĝi kun kaj ne kontraŭ la diglosio.

BIOGRAFIETO DE PROBAL DASGUPTA, PREZIDANTO DE UEA

Doktoriĝo 1980, nov-jorka universitato, genera sintakso. Instruis la lingvistikon en Nov-Jorko, Melburno, Kolkato, Puneo, Hajderabado, kaj Esperanton en Barlastono (Britio) kaj San-Francisko. Kunredaktas "Language Problems and Language Planning". Ĉefaj verkoj "Kathaar kriyaakarmo" (1987), "The Otherness of English" (1993), "After Etymology" (2000), tradukoj de kvar romanoj en Esperanton kaj unu el Esperanto. Vicprezidanto de la Akademio de Esperanto de 2001, honora membro de la Lingvistika Societo de Usono de 2004, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio de 2007. Laboras en la Lingvistika Esplorojo en la Barata Statistika Instituto, Kolkato de 2006.

Aliflanke, ne, la oficialaj lingvoj ne estas egalrajtaj nek samrangaj en la praktiko, en la ĉiutaga funkciado de la Unio. Kaj tio estas memkomprenebla.

Ni vidu nun kiamaniere funkcias la lingva reĝimo ene de la institucioj de Eŭropa Unio. La Unio konsistas el diversaj institucioj, kun diversaj funkcioj kaj kompetentoj: la plej gravaj estas la Konsilio, la Eŭropa Komisiono kaj la Eŭropa Parlamento. Aliaj institucioj estas la Kortumo, la Unuinstanca Kortumo, la Revizora Kortumo, la Ekonomia kaj Socia Komitato kaj la Komitato de la Regionoj. Kaj multaj aliaj oficejoj kaj agentejoj, kun specifaj taskoj. Alia gravega institucio post la enkonduko de la eŭro estas la Eŭropa Centra Banko, kiu estas tute sendependa.

Ĉiu institucio alprenas internan reglamenton pri la apliko de la lingva reĝimo en sia interna funkciado. Kaj tiu reĝimo varias de unu institucio al alia.

Ĉiu civitano de ĉiu membro-ŝtato povas fariĝi oficisto de la institucioj de Eŭropa Unio, kondiĉe ke li sukcesas ekzamenon. Li aŭ ŝi devas regi unu aŭ du fremdajn lingvojn, krom la propran gepatran lingvon aŭ la oficialan lingvon de lia aŭ ŝia patrujo. Tiu dependas de la institucio kaj de la funkcio de la oficisto. Sed laŭ la nova statuto de la eŭropaj oficistoj, oni devas regi almenaŭ du fremdajn lingvojn antaŭ la unua promocio. Povas okazi tamen ke homoj preferos "lerni" parencajn lingvojn: Ĉeĥoj eble lernos la slovakajn kaj Svedoj la danajn, tio estas, lingvoj kiuj estas tre proksimaj. Por fariĝi oficisto ĉe la Konsilio – kie mi mem laboras – oni devige devas regi la anglan aŭ la francan. Antaŭe, kiam mi mem kandidatiĝis, antaŭ 20 jaroj, nur la franca estis deviga.

Kompreneble, por labori en institucio, kie laboras homoj el ĉiuj membro-ŝtatoj, oni devas limigi la nombron da lingvoj uzataj en la interna komunikado. En la komenco, la plej grava lingvo estis la franca. Preskaŭ ĉiuj oficistoj de ĉiuj institucioj uzis ĝin en la ĉiutaga vivo. Ne nur ĉar ĝi estis sufiĉe prestiĝa kaj internacie konata, sed ankaŭ ĉar ĝi estis la plej parolata lingvo en la urboj kie funkcias la institucioj: Bruselo, Luksemburgo kaj Strasburgo. Ĉiuj eksterlandaj oficistoj sentis la bezonon paroli la francan, ne nur en la laborejo, sed ankaŭ ekstere, surstrate, en la butikoj, ĉie. Eĉ post la aliĝo de Britio kaj Irlando, la franca daŭre estis la plej uzata lingvo en la institucioj inter la oficistoj.

Sed iom post iom tio ŝanĝiĝis. La ŝanĝiĝo rezultis de eksteraj faktoroj kaj komenciĝis eble en 1989, kun la disfalo de la komunismaj reĝimoj en Centra kaj Orienta Eŭropo. La angla triumfis ĉie. Ekde 1995, okaze de la aliĝo de Aŭstrio, Finnlando kaj Svedio, la uzado de la angla ene de la institucioj akceliĝis pli kaj pli, malprofite al la franca. Kaj nun, post la granda plilarĝiĝo de 2004, multaj novaj oficistoj el la novaj membro-ŝtatoj parolas nur la anglan kaj ofte tute ne la francan. Post la emeritiĝo de la plej malnovaj oficistoj, la angla estos eble la sola komuniklingvo inter la eŭropaj oficistoj.

Do, se paroli pri la rolo de la lingvoj en la interna komunikado inter oficistoj oni povas diri resume ke oni uzas preskaŭ ekskluzive la anglan kaj la francan, kvankam en la personaj kontaktoj inter kolegoj oni povas uzi aliajn lingvojn: mi mem parolas nederlande kun nederlandaj kaj flandraj kolegoj aŭ itale kun Italoj. Kaj eĉ Esperanton...

Nuntempe, ĉiuj internaj informoj kaj komunikoj estas redaktitaj en la angla kaj la franca. Antaŭe ili estis ankaŭ tradukitaj en la aliajn lingvojn, sed post la aliĝo de Aŭstrio, Finnlando kaj Svedio en 1995 tio ne plu okazas.

Alia afero estas la uzado de laborlingvoj, tio estas, de la lingvoj en kiuj oni redaktas dokumentojn kaj kiujn oni uzas dum laborkunvenoj. Mi jam diris antaŭe, ke la uzado de lingvoj varias de unu institucio al alia.

Ĝis nun, nur la oficialaj lingvoj de la membro-ŝtatoj fariĝis ankaŭ oficialaj lingvoj de Eŭropa Unio. Sed en pluraj membro-ŝtatoj oni parolas ankaŭ regionajn kaj minoritatajn lingvojn, kiuj estas parolataj de milionoj da civitanoj. Tamen, en Junio 2005 la Konsilio decidis permesi la uzadon de regionaj kaj minoritataj lingvoj en la eŭrop-uniaj institucioj, kondiĉe ke tiuj lingvoj havu la statuson de oficiala lingvo en parto de la teritorio de iu membro-ŝtato kaj ke la koncerna membro-ŝtato pagu la kostojn de la tradukado kaj interpretado. En Decembro, la Komisiono subskribis administrativan aranĝon kun Hispanio pri la uzado de la regionaj lingvoj de tiu lando. Temas pri la baska aŭ eŭska, la kataluna kaj la galega. Hispanio mem zorgas pri la tradukado el kaj en tiujn lingvojn.

Ni revenu nun al la oficialaj lingvoj. Do, en tiu ĉi momento, Eŭropa Unio havas 27 membro-ŝtatoj kaj 23 oficialajn kaj laborlingvojn. Bonŝance, oni povas diri, pluraj lingvoj estas parolataj en pluraj membro-ŝtatoj, alie la nombro de oficialaj lingvoj estus pli granda. Aŭstrio, Belgio, Luksemburgo kaj Kipro ne havas apartan lingvon. La germana havas la plej grandan nombron da parolantoj kaj estas oficiala en Germanio kaj Aŭstrio – sed ankaŭ en Belgio. La franca estas oficiala en Francio, Belgio kaj Luksemburgo. La angla estas la lingvo de Britio kaj de la plej multaj irlandanoj. La grekan oni parolas en Grekio kaj en Kipro. Kaj kompreneble, la nederlandan lingvon oni parolas en Nederlando kaj en Belgio. Aliflanke, pluraj landoj havas pli ol unu oficiala lingvo: Belgio havas tri, kiel vi scias – kiam la reĝo alparolas la civitanojn li faras tion en la nederlanda, franca kaj germana.

Kroatio kaj Turkio estas kandidato-ŝtatoj, kun kiuj Eŭropa Unio jam intertraktas cele al ilia aliĝo. Kaj eble aliaj landoj sekvos. Konklude, oni povas aserti ke la nombro da oficialaj lingvoj ankoraŭ ne atingis la maksimumon. Eĉ se Turkio neniam fariĝos membro de Eŭropa Unio, la turka povos fariĝi oficiala en la Unio, se kaj kiam la norda parto de Kipro reunuiĝos kun la suda parto.

2. Uzado de la lingvoj ene de la Unio

Ĉu la 23 oficialaj lingvoj de la Unio estas vere egalrajtaj kaj samrangaj kaj ĉu ili estas ĉiuj uzataj kiel laborlingvoj? Kelkaj ja estas gravaj lingvoj, kun centoj aŭ dekoj da milionoj da parolantoj, kiel la angla, la germana, la franca, la itala kaj la hispana. La portugala, kun nur 10 milionoj da parolantoj en Eŭropo, rangas tamen inter la plej gravaj lingvoj de la mondo, ĉar ĝi estas parolata – de pli ol 200 milionoj da homoj – en pluraj ekstereŭropaj landoj, samkiel la angla, la franca kaj la hispana. Aliflanke, kelkaj lingvoj havas nur kelkajn milionojn aŭ eĉ malpli ol unu miliono da parolantoj. Tiu estas la kazo de la latva, estona, malta kaj irlanda, se paroli nur pri la plej "etaj" lingvoj. La kataluna, kiu estas regiona lingvo de Hispanio kaj ne estas oficiala en la Unio, estas parolata de pli da homoj ol la dana, la finna, la slovena. Do, laŭ la nombro da parolantoj, la oficialaj lingvoj de Eŭropa Unio ne estas samrangaj. Pro tio, mi ripetetas mian demandon: ĉu la 23 oficialaj lingvoj de la Unio estas vere egalrajtaj kaj samrangaj en la Unio? Kaj mi devas respondi: jes kaj ne.

Jes. Ili estas egalrajtaj kaj samrangaj laŭjure. Ĉiuj traktatoj, reglementoj, decidoj kaj direktivoj – tio estas, ĉiuj leĝoj – sed ankaŭ ĉiuj resolucioj de la Konsilio kaj de la Eŭropa Parlamento povas nur esti aprobitaj kiam ili estas haveblaj en ĉiu lingvo kaj estas same validaj en ĉiu oficiala lingvo. Ili devas esti publikigitaj en la Oficiala Gazeto de Eŭropa Unio, kiu aperas en ĉiu oficiala lingvo.

LANGROMPILOJ

1. Avara avo al bazaro vane venis vendi varon.
2. Aperis apro sur areo de arkeo.
3. Basta bastono batas bone.
4. Beto ne estas besto; ne el betono estas beto.
5. Citrono, cepo kaj celero acidaj spicoj estas.
6. Ĉevalo ĉaron tiras ĉirkau ĉerizejo.
7. Dama domo en densa odoro dronas.
8. Ermita erinaco enuas pro manko de erotiko.
9. Freneza faraono fuŝis formon de flakono.
10. Generalo generas genepojn; gazelo legas gazetojn.
11. Ĝemu: ja ĝardeno iĝis ĝangalon!
12. Herkula gasto hastas al hedera heĝo.
13. Ĥana ĥoro en ĥalatoj kantas. Ĥimera hundo hantas.
14. Indico de indiĝeno iĝis impona imagipovo.
15. Colo post colo licas parcelon pecetigi.
16. En jonosfero jelpas jeto!

ANIMALOJ BLEKAS

Abelo zumas	akciprito kriĉas	alaŭdo trilas
ansero gakas	azeno iaas, henas	birdo kvivitas, kvikas
bufo kvakas	cikado ĉirkas	ĉevalo henas, ternas, snufas
delfeno fajfas	fiŝo mutas	grilo grincas, ĉirpas
gufo ululas	homo parolas, krias	hundo bojas, hojlas
hundo malkontenta graŭlas	hundo vundita jelpas	kapro mekas
kato miaŭas, ŝpinas	kato kontenta ronronas	koko kokerikas
kolombo kveras, rukulas	korniko grakas	korvo grakas
kukolo kukuas	leono roras	lupo hurlas, ululas, hojlas
melro fajfas	monedo grakas	muŝo zumas
muso pepas	papago parolas	pasero pepas
pirolo fajfas	porko gruntas	rano kvakas
skarabo zumas	serpento siblas	strigo ululas
ŝafo beas	ŝakalo jelpas	tigro roras
turto ĝemas, kveras	urso murmuras, ĝemas	vulpo bojas

JES! EBLE! NE!

Se vi volas diri "jes!"

Definitive.
Certe!
Jes ja!
Kompreneble!
Senprobleme!
Nepre!
Sendube!
Cent-procente!
Konvinkite.
Akceptite.

Se vi ne estas certa...

Imageblas.
Mi ne certas.
Verŝajne...
Oni povus tiel diri!
Pli-malpli.
Supozeble...
Eble...
Probable...
Povas esti...
Kredeble...

Se vi volas diri "ne!"

Ĉu vi frenezigiĝis?
Tute ne!
Ne eblas!
Certe ne!
Kion vi pensas?
Kia demando!
Absolute ne eblas!
Forgesu pri tio!
Kia sensencaĵo!
Kia stultaĵo!

AZIANOJ DORMEMAJ

Tra interreto anoncita: Gajnante ricevu du flugbiletoj por Pekinaj Olimpikoj.



1. Kiaj studentoj ŝajnas esti lacaj au dormemaj?
 2. Kiom da knaboj kaj kiom da knabinoj?
 3. Kiom da malinaj ĝemeloj?
 4. Kiom da ĝemelinoj?
 5. Kiu estas la profesoro?
 6. Ĉu ĉinoj, mongoloj, koreanoj, japanoj, usonanoj, aliaj?
- Dezirojn de bonĉanco!

MAGIA KVADRATO

vertikale kaj horizontale:

1. Perforta disromp'
2. Priskrib' aŭ priparol' de okazintaĵ'
3. Ne komuna, sola
4. Plektita, malgranda uj'
5. Granda trafikvoj' (aŭ vejn')
6. Staranta tenigil'

LINGVA POLITIKO DE EŬROPA UNIO: TEORIO KAJ PRAKTIKO1. Oficialaj lingvoj post la laŭvicaj plilarĝigoj

La nuna Eŭropa Unio estas unuiĝo de landoj, kiu rezultas el longdaŭra procezo, komenciĝinta fakte jam em 1952, kiam ekfunkciis la Eŭropa Komunumo por Karbo kaj Ŝtalo. Tamen oni konsideras ke la fundamento de la nuna Eŭropa Unio estas la Traktato de Romo, subskribita en 1957, per kiu estis kreita la Eŭropa Ekonomia Komunumo, samtempe kun la Eŭropa Komunumo por Atomenergio, pli konata kiel Eŭratom'. Ekde la 1-a de Novembro 1993, kiam la Traktato de Mastrohto ekvalidis, la tri Komunumoj kunfandiĝis en la nuna Eŭropa Unio, kiu havas multe pli da kompetentoj.

Kiel sciante, la Eŭropaj Komunumoj havis ses fondintajn membro-ŝtatojn: Belgio, Francio, la Federala Germana Respubliko, Italio, Luksemburgo kaj Nederlando. En tiuj landoj estas kvar oficialaj lingvoj: la franca, germana, itala kaj nederlanda. Ekde la komenco, oni decidis ke la kvar oficialaj lingvoj de la membro-ŝtatoj estas ankaŭ oficialaj lingvoj – kaj ankaŭ laborlingvoj – de la Komunumoj, samrajte kaj samrange. Ĉiuj oficialaj dokumentoj devas esti publikigitaj en ĉiuj oficialaj lingvoj. En ĉiu kunveno kadre de la Komunumoj oni rajtas paroli iu ajn el la oficialaj lingvoj, kun simultana interpretado en la aliajn lingvojn. Ĉiu civitano el la membro-ŝtatoj rajtas kontakti la Komunumojn en sia propra lingvo kaj la respondoj devas esti redaktataj en la sama lingvo.

Tiuj fundamentaj principoj pri la egalrajteco de la lingvoj estis en la komenco relative facile aplikeblaj. Temis pri nur kvar lingvoj... Tamen, en la daŭro de la jaroj, pli kaj pli da landoj aliĝos al la Komunumoj kaj la nombro da lingvoj kreskos ankaŭ.

En 1973 okazis la unua plilarĝigo de la Komunumoj: Britio, Danlando kaj Irlando fariĝis membro-ŝtatoj kaj alportis du pliajn oficialajn lingvojn, la anglan kaj la danan. Aŭ pli bone dirite, tri: la irlanda (gaela), kvankam oficiala, ne fariĝis laborlingvo, sed nur traktato-lingvo. Tio estas: ĉiuj traktatoj devis esti ankaŭ redaktataj en tiu lingvo, ĉar la gaela estas oficiala lingvo de Irlando, paralele al la angla, kvankam nur malgranda minoritato parolas ĝin.

En 1981, Grekio fariĝis la 10-a membro-ŝtato kaj la greka la sepa oficiala lingvo. En 1986 sekvis Hispanio kaj Portugalio kun siaj respektivaj lingvoj. En 1995 aliĝis Aŭstrio, Finnlando kaj Svedio, kiuj alportis du novajn lingvojn, la finnan kaj la svedan. La nombro da oficialaj lingvoj atingis tiam dek unu.

Sed en 2004 okazis la plej grava plilarĝigo de la Eŭropa Unio ĝis nun, kiam dek novaj membro-ŝtatoj aliĝis: Ĉeĥio, Estonio, Hungario, Kipro, Latvio, Litovio, Malto, Pollando, Slovakio, Slovenio. Aldoniĝis 9 novaj lingvoj: la ĉeĥa, estona, hungara, latva, litova, malta, pola, slovaka kaj slovena. Laste – sed ne fine – Bulgario kaj Rumanio fariĝis en 2007 la lastaj aliĝintaj membro-ŝtatoj, aldonante du lingvojn pli: la bulgaran kaj la rumanan. Samtempe, ekde la 1 de Januaro 2007, la statuso de la irlanda ŝanĝiĝis kaj ĝi fariĝis ankaŭ oficiala, kvankam dum periodo de kvin jaroj ne ĉiuj dokumentoj estos tradukitaj en ĝin, sed nur la reglamentoj adoptitaj kune de la Eŭropa Parlamento kaj de la Konsilio kaj la korespondaĵoj de kaj al irlandaj civitanoj.

93 A UNIVERSALA KONGRESO, ROTERDAMO, 19-26 JULIO



La Kongresejo



Prelego de Probal Dasgupta kaj koncerto en la salono Zamenhof

MEMBROJ KAJ LERNANTOJ DE LA ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO
vespermanĝis kune en la restoracio Ruĝantino,
oficiale fermante la lernaron.

EBG 25-06-2008



Kunveno en agrabla restoracio

EBG 25-06-2008



Fotoj de Birdino, Francine Sperber

FOTOJ DE KUNVENOJ KAJ KONGRESOJ DUM 2008



Bruselo, EBG, lernantoj de 2_a kaj 1_a gradoj, 11-18 Junio 2008



Bruselo, EBG, kunveno de 11 Junio 2008;



Ostendo, Asembleo BEF, 5 Aprilo 2008



Bruselo, Kunveno EEU, 9 Marto 2008;



Roterdamo, UEA malferma tago, 26 Aprilo 2008



Ventspilslo, Latvio, 44_a BET, 2-12 Julio 2008;



Olsztyno, Pollando, Fresho, 26-2 Julio 2008



Fortaleza, 43_a Brazila K, 12-16 Julio 2008;



Vilno, Litovio, Teĵa, 26-30 Majo 2008;



Kvenko, 67_a Hispana K, 2-6 Julio 2008



Jalto Aroma, Krimeo, Ukrainio, 1-10 Majo 2008



Kopenhago, DEA Jubileo 100 jara, 19 Aprilo 2008;



Senigallio, Italio, IJF, 15-24 Marto 2008



Bengaluro, Hindio, 5_a Azia K, 12-15 Februaro 2008;



Malborko, Pollando, Ago-semajno, 27-2 Januaro

